

Pri la libro *Bon voisinage* de Pierre Hirsch
pri la korespondado de Romain Rolland kun Edmond Privat
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 725, 1977.08.31 & 09.02 & 03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La eldonejoj **À la Baconnière** en Neuchâtel kaj **Albin Michel** en Parizo publikigis tre agrable legeblan franclingvan libron, kiu tutcerte havos certan eĥon en esperantio. Temas pri la verko de Pierre Hirsch – la arkivisto de la Dokumentaro Edmond Privat ĉe la biblioteko de la urbo La Chaux-de-onds – titolita *Bon voisinage*, kion ni traduku per *Agrabla Najbarumo*.

A.- La najbaroj estis unuflanke la gefratoj Romain kaj Madeleine Rolland kaj aliflanke la geedzoj Edmond kaj Yvonne Privat. En la libro *Bon voisinage* ĝuste la korespondadon inter Romain Rolland kaj Edmond Privat publikigas Pierre Hirsch kun eroj el la tagĵurnalo kaj notkajeroj de Romain Rolland kaj kun aldono de utilaj prinotoj.

Cl.- Rezultas interesa fresko pri la intelekta kaj pacbatala vivo inter la jaroj 1915 kaj 1945, kiu permesas al la leganto repensi fundamentajn eventojn : la provon stari super la batalkampoj ; la organizon de internaciaj kongresoj ; la serĉadon de neperfortaj luktemodeloj ; la helpon al Mahatmo Gandhi kaj aliaj pac-herooj ; la defendon de subpremitaj popoloj liberigantaj kiel la pola kaj la hinda, ktp.

A.- Estas interese scii, ke Romain Rolland konsideris Edmondon Privat kiel ian « eksteran antenon ». Tial li komunikadis al li ĉion, kion li opiniis utila al pli ekzakta kompreno de la situacio fare de socialismaj kaj pacismaj rondoj. La korespondado Rolland-Privat neniel estas elverŝo de amikeco kaj reciproka estimo ; ĝi estas pens-interŝanĝo cele al agado. El tio ĝia daŭra intereso.

Cl.- Laŭ Pierre Hirsch ne estas dubo, ke Romain Rolland profunde inspiris Edmondon Privat, direktante lin al agema sinteno : Edmond Privat fariĝis propagandisto kaj disvatiganto de ideoj de Romain Rolland. La svisa verkisto kaj ĵurnalisto, kiu ne sentis sin kabinetulo, sed agemulo, sub la influo de la penso de la eŭropa patrioto, oferis sian vivon favore al la defendo de la homa digno kun religia respekto por ĉio homeca kaj kun kuraĝa luktemo kontraŭ ĉio hom-sklaviga. La verko *Bon Voisinage* montras, kiel konkrete Romain Rolland kaj Edmond Privat meditis pri la eventoj, kiujn ili travivis, por povi ilin alfronti okaze de objektiva neceso.

A.- La amikeco inter Romain Rolland kaj Edmond Privat daŭre restis sennuba dum tridek jaroj. Vidvino Marie Romain Rolland antaŭvorte al *Bon Voisinage* raportas (ni citas) : « *Kiam geedzoj Privat venis en la vilaon Olga, ilia afableco kaj simpleco alportis en nian domon, kiun ĉiam saturadis la fulmotondroj de la mondo, atmosferon malstreĉitan, kiu estis bonfartiga por Romain Rolland.* » Ĉiam pri la profundeco de tiu amikeco ni menciis la aldonon, kiun faris Romain Rolland en 1926 sur tagĵurnala paĝo de junio 1916. « *Edmond Privat estas unu el la homoj la plej honestaj, la plej neprofitemaj, kiujn mi konis. Mi havas por li estimegon, kiun la vivo konfirmis.* »

Cl.- Pierre Hirsch atentigas nin pri la unikeco de tiu ĉi reciproka konfido. Ni citu lin : « *Mi ne kredas, ke ekzistis multaj amikoj de Romain Rolland, al kiuj la verkisto – tiom ĵaluza pri sia sendependeco kaj zorgo ne malekvilibri en si mem la harmonion de la maloj – donis permeson subskribi ion lianome. alvokon aŭ proteston. En speco de testamentata atentigo, kiun oni malkovras en lia intima tagĵurnalo je la dato aprilo 1936, Romain Rolland skribis : « [...]*

*Mi malpermesas al ĉiuj senescepte – kaj aparte al tiuj, kiuj sin pretendas miaj amikoj – ĉian rajton paroli **je mia nomo**. Mi tro ofte vidis, ekde la komenco de mia kariero – kaj multe pli ekde kiam mi min enmiksi en agbatalojn – la malrespektan pretendon de **posedanto**, kiun al si arogas la malplej grandaj el tiuj, kun kiuj mi siatempe interŝanĝis kelkajn parolojn aŭ leterojn pri mia penso – pri **mia vera penso**, kies ŝlosilon ĉiuj el ili fanfaronacas posedi. »* Koncerne Edmondon Privat Pierre Hirsch aldonas : « *Kaj tamen Edmond Privat ricevis tiun ĉi konfid-ateston, kiam lin ŝarĝis Romain Rolland por eskorti Gandhi el de Villeneuve al tra Italio faŝisma, kaj, post invito de la Mahatmo lin akompani Hindien. Jen kion Romain Rolland skribis al Edmond Privat la 7-an de januaro 1932, kiam Gandhi estis ĵus arestita post sia reveno el Eŭropo : « Uzu mian nomon por ĉiuj protestoj kaj publikaj agadoj, kiuj okazas aŭ okazos por la granda kaŭzo – pli ol nure hinda de satjagraho de martira popolo verŝanta sian sangon por la homaro entuta [...]. »*

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012